

## **VERDPARTIA KOMUNA MANIFESTO**

Reprezentantoj de membropartioj de la EGP (Eŭropa Verda partio) ene de EU en komuna proceduro verkis komunan manifeston por la elektoj al la Eŭropa Parlamento. Okaze de la Elekto-Kunveno en Bruselo, 2014-02-22 ĝi estis decidita de la ĉeestantaj delegitoj de la Verdaj partioj.

### **ESTIMATA EŬROPA CIVITANO.**

Ekde la 22a ĝis 25a de Majo 2014 vi havas la ŝancon partopreni en la voĉdonado por la eŭropa parlamento. Ni ŝatas inviti vin al ĝi kaj esperas, ke vi voĉdonos verdule.

Ĉi-jare oni memorigas, ke la unua mondmilito komenciĝis antaŭ 100 jaroj kaj pasis 57 jaroj post la Traktato de Romo, kiu markis la fundon de tio, kio nun estas Eŭropa Unio. La eŭropa unuiĝo liberigis la kontinenton disde jarcentoj da malamikecoj kaj militoj. Ĝi estis la inspiro por la forpelo de diktaturoj kaj absolutismaj reĝimoj. Ĝi ebligis la ekonomian reconstruon de la membroŝtatoj en spirito de sociala justeco kaj ĝi igas nin pioniroj por daŭrigebla natur-medio. Ĉiu plivastigo pli riĉigis niajn kulturojn, ebligis al ni koni unu la alian kaj igas nin ĉiujn parto de la sama defia projekto. Sendube la realigo de Eŭropa Unio estis historia sukceso..

### **EŬROPO NUN ESTAS SUR VOJKRUCIĜO**

Ni, Eŭropaj Verduloj, kredas, ke Eŭropo estas nia komuna hejmo kaj estonteco, sed tiu estonteco estas minacata. Por konservi kaj plivastigi la sukcesojn de EU necesas fundamenta politika reorientigo kaj demokratia renovigo de Eŭropa Unio. Por gardi nian komunan estontecon ni volas ŝanĝi Eŭropon plifortigante ĝin. Tial ni favoras plian solidarecon, daŭrigeblon kaj justecon. Se ni preferus demagogion, naciismon aŭ ekonomian ŝovinismon, neniu regiono, neniu lando, neniu parto de Eŭropo per si mem restus prospera. En tutmondiĝinta mondo, ni sole per kunlaborado havas ŝancon superi la grandegajn estontajn defiojn en la sociaj, ekologiaj, ekonomiaj kaj sekurecaj kampoj. Ni bezonas justan ekonomian kunlaboradon, en kiu niaj respondecoj pri la medio estas konsiderataj. Ni bezonas solidarecon en kaj inter niaj nacioj. Ni bezonas fortan demokration. Ni volas vivi laŭ niaj valoroj kaj liberoj, kaj firmigi liberojn en niaj propraj landoj kaj ankaŭ firmigi ilin internacie.

### **KRIZO ESTIGAS TIMON KAJ MALKONTENTON NI VOLAS ESTIGI ESPERON KAJ SEKURECON**

La novliberala malreguligo kreis financajn merkatojn, kiuj estas pelataj sole per havemo kaj tuj-gajnemo. Tio estigis la tutmondan financon krizon, kiu ankoraŭ maltrankviligas nin. Tiu krizo minacis aŭ detruis tiom da socialaj, demokratiaj kaj ekonomiaj akiritaĵoj, kaj sekve de ĝi la koncepto de Eŭropa Unio estas minacata de kreskanta sento de frustriĝo, timo kaj eĉ kolero. La medikamento de limigo de elspezoj, kiu jam dum kelkaj jaroj estas preskribita al landoj en krizo pligrandigis la socialajn malegalecojn kaj maljustecojn, endanĝerigis la prosperon de multaj el niaj kuncivitanoj, subfosis la floradon de niaj socioj, kaj – gravege – malplifortigis la demokration. Nuntempe 25% el la eŭropanoj riskas malriĉecon aŭ socialan ekskludon; 27 milionoj estas senlaboraj, inter ili estas preskaŭ kvinono de la junaj eŭropanoj ! La plej vundeblaj evidente pagas la plej altan prezon por la krizo. Ne estas surprizo, ke tiu maljusto nutras timon kaj koleron tra nia tuta kontinento. Ni konsentas kun tiu kolero, sed volas transformi ĝin en esperon.

Nia nuna ekonomia modelo estas ne-daŭrigebla. La media krizo daŭras. La ne-povo atingi tutmondan konsenton en klimatkonferencoj vidigas, kiel malproksime ni estas de la evito de katastrofa klimatsanĝiĝo.

Miopeca perspektivo kaj la unuflankaj intereso de lobiistoj daŭre superadas. Eŭropo estas esenca por la konstruado de la pli daŭrigebla, demokratia kaj egalrajteca socio, kiun ni postulas. La

bridado de la potenco de la financaj merkatoj kaj de tutmondaj entreprenoj, la efika kontraŭbatalado de imposta trompado kaj evitado, la transformo de la energiliverado de Eŭropo por kontraŭi la rapidiĝantan klimatsanĝiĝon. Ĉio ĉi estas ekzemploj de urĝaj agadoj, kiuj superas la eblojn de eĉ la plej grandaj el niaj membroŝtatoj. Ni kunlaboru ene de EU por efike trakti tiujn problemojn.

La transformo, por kiu ni pledas, okazu man-en-mane kun demokratia rekonstruo. Ni volas Eŭropan Union, kiu estas pioniro por pli rekta kaj partoprena demokratio. Plenumantaj instancoj, kiaj la Eŭropa Komisiono kaj Centra Banko estu respondecigataj pri siaj agadoj. EU estu efika plurnivela demokratio, kiu uzas sian diversecon, kiel unu el siaj plej bonaj atutoj, kun respekto por malcentra decidopovo.

## VIA VOĈDONO GRAVAS – NI BATALU POR EŬROPA ALTERNATIVO

Ni invitas vin batali kun ni por ekonomia, politika kaj sociala transformo, sur kiu la estonta prospero, surbaze de daŭrigebla evoluigo kaj verdula renaskiĝo de nia industrio, estos bazata. Per kohera kaj daŭrigebla estrado kaj novaj investadoj realigeblas multaj verdaj postenoj, kiuj zorgas por bona kaj deca laboro, egala salajro, laboristaj rajtoj, kreskanta ekonomia moveblo, regiona evoluigo kaj pli bonaj ŝancoj por malgrandaj aŭ mezgrandaj aŭ socialaj entreprenoj. Ni insistas pri eŭropa energipolitiko, kiu limigos la klimatsanĝiĝon: jes por renovigebla kaj efika energio; jes, por iompostioma forigo de atomenergio kaj karbo kaj ne al skistogaso. Ĉio ĉi estas parto de nia "Verdula Nova Interkonsento"

La Eŭropaj Verduloj restas fidindaj favorantoj de ekologia respondeco. Helpu nin preni fortan starpunkton kontraŭ tiuj – kaj maldekstruloj kaj dekstruloj, kaj de lobiistoj kiuj volas bari la progreson. Ni postulas pli daŭrigeblan terkultivadon kaj ludis gravan rolon en la transformado de la fiŝada politiko de EU. Ni favoras plian travideblon kaj respondecon de entreprenoj. Kohere ni penis por konsumanto- kaj civitano-raĵtoj. Konduti ekologie estas ankaŭ socia respondeco. Se la medio detruigas, ankaŭ detruigas la bazo de nia ekonomio kaj de nia prospero.

La Eŭropaj Verduloj mobilizas sub la flago de sociala justeco kontraŭ socia ekskluzivemo kaj sub la flago de daŭrigeblo kontraŭ rigida ŝparemo. Ni volas vivi kiel homoj, por kiuj sekureco kaj ŝancoj estas ne nur rakontoj el antaŭaj tempoj. EU sen dubo ŝanĝu la direkton! Ni batalas kontraŭ junulara senlaboreco, kontraŭ senhejmeco, kontraŭ malriĉeco kaj senespero. Tie, kie membroŝtatoj individue rifuzas agi, aŭ ne sukcesas, ni kune kiel eŭropaj civitanoj povas superi tion. Ni konstruu socialan Eŭropon.

Ni vidas, ke individua emancipiĝo, libereco kaj civitanaj rajtoj por ni ĉiuj estas minacataj. Pensu pri la amasa kontrolado fare de privataj aŭ publikaj agantoj, aŭ pri malobservo de la fundamentaj rajtoj de minoritatoj, kiaj enmigrantoj, la LGTB+ \* komunumo aŭ la Romaoj. Ni nenial toleru diskriminacion, pro iu ajn kialo, ĉu sekso, raso, haŭtkoloro, etna aŭ socia deveno, genetikaj proprecoj, lingvo, kredo aŭ religio, politika aŭ alia opinio, membreco de nacia minoritato, posedo, naskiĝo, invalideco, aĝo, seksa orientiĝo, genra identeco aŭ alia preteksto. Seksa (genra) egalrajteco estas fundamenta principo de Eŭropa Unio. Tamen ekzistas granda abismo inter agnosko de rajto, la akirita jura progreso kaj la aplikado. La Verduloj subtenas duoblan aliron al la antaŭenigo de genra egalrajteco kaj povigo de virinoj: atentado por egalrajteco inter viroj kaj virinoj en ĉiuj politikaj kampoj, kune kun klaraj kaj devigaj celoj por akiri seksan egalrajtecon je ĉiuj niveloj.

Ni bezonas Deklaracion de Ciferecaj Rajtoj por garantii niajn hereditajn liberecojn en la cifereca epoko. Ni kunlaboris por aboli la Komercon Konvencion kontraŭ Falsigado (KKKF) (angle: Anti-Counterfeiting Trade Agreement - ACTA), kiu minacis nian liberecon. Ni defendis la rajton pri akvo kontraŭ la premo al la privatigo. Tiaj bataloj tuŝas la kernajn valorojn de Eŭropo.

La Verduloj volas revivigi la eŭropan demokration, kiu malfortigis per la forto de lobiistoj, per la mallong-vida defendo de siaj propraj interesoj fare de la naciaj registaroj, per la povo donita al teĥnokratoj sen demokratia kontrolo kaj per la strategio de la populistoj, kiuj serĉas "pro-pekano kapron". La eŭropa parlamento estu plifortigata kaj havu kontrolon super la politiko, al kiu strebas la Eŭropa Komisiono, la Internacia Mona Fonduso (IMF) kaj la Eŭropa Centra Banko en la tiel nomata trojko. La civitanoj estu pli bone aŭdataj, kaj ili havu pli klaran voĉon pere de rekta demokratio. EU agu, kie necesas komuna voĉo, sed ne faru decidojn fore kaj dise de la civitanoj. Tio implicas la plian forigon de ekscesa lobiado. Ni ankaŭ volas pli da egaleco inter la seksaj rajtoj: pli da virinoj en la eŭropaj institucioj kaj en la eŭropaj entreprenaj estraroj.

Ni ne timu la kundividon de nia suvereneco, se tio estas la sola maniero por konservi ĝin; kiel pri la banka unio, la impostoj pri financaj transakcioj kaj la batalo por justaj impostoj kaj kontraŭ la impost-evito kaj la impostaj paradizoj. EU strebu al politiko de bona najbareco ĉe niaj limoj kaj ekster ili. Tio ampleksas kulturen interŝanĝon, komunajn klerigajn projektojn, kaj ankaŭ signifas, ke la pordo al ampleksiĝo restas malfermita. Ni favoras tutmondan justecon, justan komercadon, protektadon de homaj rajtoj, civitanan preventon de konfliktoj kaj plurflankajn solvojn por konfliktoj. EU estu sekura rifuĝejo por fuĝantoj, ne "eŭropa fortikaĵo". Eŭropo, kiu akceptas sian tutmondan respondecon estas bono por la mondo kaj por ni.

## ESTAS VIA ELEKTO

Kiel la rekte elektita voĉo de la eŭropa civitanoj la eŭropa parlamento kune kun la naciaj registaroj estas la komuna leĝodonanto por temoj, kiuj influas vian ĉiutagan vivon. Tiuj etendiĝas de sekureco en la laborejo ĝis novigo kaj novaj postenoj, de protekto al konsumantoj ĝis mediopolitiko, de nutraĵosekureco kaj bestoprotektado ĝis datenrilata privateco ĝis seksa egalrajteco. Tio ankaŭ helpas por financi lokajn kaj regionajn projektojn por daŭrigebla evoluigo kaj socia integriĝo. La Verduloj „faras la diferencon“ en la eŭropa parlamento. Ni volas daŭrigi tion per pli da forto. Por fari tion ni bezonas vian subtenon, vian voĉon.

Helpu ŝanĝi Eŭropon, voĉdonu por la Verduloj !

## EŬROPO BEZONAS VERDAN NOVAN INTERKONSENTON „Green New Deal“

En la nuna krizo Eŭropa Unio ne sukcesis plenumi siajn promesojn. Kaj ĝi tute ne samopiniis pri la maniero plibonigi tion. Tial la Eŭropaj Verduloj proponas novan strategion.

Ni, eŭropanoj, devas unuigi niajn fortojn, tio estas la senco de suvereneco, por formi nian propran estontecon. Anstataŭ la sociale surdaj kaj ekologie blindaj ŝparoj, ni proponas tri koherajn manierojn al daŭrigeblo: kontraŭbatali senlaborecon, malriĉecon kaj ĉiajn sociajn maljustecojn; transformi niajn ekonomiojn per renovigo kaj ekologie efikaj solvoj por kontraŭ klimatsanĝiĝon kaj ekologian detruadon; kaj rereguli la financon fakon, por ke tiu servu al la ekonomio. Ni nomas tion eŭropa „Verda Nova Interkonsento“.

## SOLIDARECO, SOLIDECO KAJ DAŬRIGEBLO

Ni ne volas, ke EU kaj ĝiaj membroŝtatoj kliniĝu sub ekstremaj ŝuldoj, kiuj ŝarĝas civitanojn kaj estontajn generaciojn. Tio signifas, ke la financaj ŝuldoj, publikaj aŭ privataj, estu reduktataj al eltenebla nivelo, kaj ni zorgu, ke la mono estu uzata por daŭrigeblaj, volorestigaj investoj. Tio signifos en certaj okazoj restrukturigon de publikajn kaj privatajn ŝuldojn. Ni ankaŭ traktu la socialajn mankojn: malpliigo de senlaboreco, malriĉeco kaj malegaleco, plibonigo de sano kaj klerigo. Tio postulas signifajn investojn. Sed ĝi certe ankaŭ postulas trakton de la ekologiaj ŝuldoj: klimatsanĝiĝo, elĉerpiĝo de limigitaj resursoj kaj la erozio de biologia diverseco. Ni bezonas vivantan kamparon kun daŭrigebla terkultivado kaj ekonomie kaj socie florantaj kamparaj regionoj,

kaj abundaj fiŝaroj por vivteni marbordajn sociojn.

Iĝante tutmonde gvidanta en la elpensado kaj liverado de solvoj, kiuj ebligas bonan vivon al ĉiuj, kun respekto por la limiteco de nia planedo, ni trovas la ŝlosilon por nova ekonomia dinamiko por postenoj kaj prospero. Ni malaprobas la tiel nomatan pakton por konkurecopovo, ĉar tiu kondukos al salajraj malaltigoj, malpliigo de la sociala prospero kaj privatigo de publikaj posedaĵoj. Fiska daŭrigeblo iru man-en-mane kun forta socia kaj ekologia daŭrigeblo – kaj la plej fortaj ŝultroj portu la plej pezajn ŝarĝojn. Troa ŝparado, kia komencita en la freŝdata ekonomia krizo, kondukas nin en la malbonan direkton.

## BAZIGI SOCIALAN EŬROPON

Eŭropo estu konstruata sur bazo de sociala justeco. Tamen por pliiĝanta nombro da homoj la socialaj problemoj iĝis realo. Eŭropaj Verduloj kredas je politiko, kiu traktas la kreskantan malegalecon kaj nepre opinias, ke en EU ne estu duarangaj civitanoj. Tial gravegas, ke oni konsideru la socialan postsekvon de aferoj, kiaj malegaleco kaj malriĉeco.

Vasta senlaboreco, precipe ĉe la junularo, kaj malriĉeco ĉe pliaĝaj, estas grava elemento de malegaleco. Politikaj rimedoj, kiuj promesas pliboniĝon, kia Eŭropa Junulara Garantio (garantio ke junuloj en EU trovu edukon kaj laborlokon) ne sukcesos, se ili ne estos taŭge financataj kaj precipe subtenataj per forta politiko de postenkreado. Membroŝtatoj daŭrigu la traktadon de infana malriĉeco per evidente taŭgaj preventaj investoj en frua fazo. EU ĉesigu malaltkoston dungadon, sendaŭrajn kontraktojn kaj maljustajn profesiajn staĝojn (praktikumo). La Eŭropa Verduloj favoras justan kaj iom post iom pliboniĝantajn socialajn normojn responde al la naciaj cirkonstancoj kaj labormerkataj modeloj - precipe koncerne la kvaliton kaj sekurecon de postenoj, de salajroj, de publika sano kaj de pensioj. Ni volas akiri pli bonan transigeblon de socialaj pagoj per enkonduko de eŭropa sociala karto kun altaj kaj devigaj normoj pri privateco, kiuj faciligas administraciajn procesojn en la diversaj landoj, kaj kiuj igas veran eŭropan civitanecon pli konkreta.

Ni volas, ke la Eŭropa Centra Banko (ECB) enskribu makroekonomian kaj financon stabilecon en siajn politikajn celojn, kiuj ankaŭ enhavu la progresigon de dungado. Krome por stimuli la dungadon ni plie kunlaboru por igi la projekton de la interna merkato plene funkcia, precipe en la kampo de libera moviĝo de laboristoj kaj servoj.

Ni pledas por enigi klaŭzon por sociala progreso en la eŭropan juron, kiu devus emfazi la prioritaton de konstruo de sociala Eŭropo. Sociala ekvilibro en tuta Eŭropo kontraŭu la minacon de cerboforĉerpado, precipe de junuloj – for el la regionoj trafitaj de la krizo, kaj la ekspluatado de migrantoj, kun respekto al la fundamenta rajto pri libera moviĝo. La Verduloj volas, ke novaj rimedoj estu evoluigataj por limigi pli grandajn diferencojn en ekonomiaj cikloj, inkluzive de ciferoj pri senlaboreco. Ni antaŭenigas la emancipiĝon de virinoj en la socio kaj en la ekonomio. "Egala salajro por egala laboro" iĝu la normo en la tuta EU, same kiel egala reprezentado de virinoj en la estrado de entreprenoj. Havi familion aŭ partopreni en zorgoj ne estu malhelpoj por sukcesa kariero kaj por viroj kaj por virinoj. Por kontraŭi aĝan diskriminacion la Verduloj kontraŭas ĉiun aĝolimon por aliro al publikaj servoj, kaj ni favoras la aplikon de fidindaj bazaj normoj en la pensiaj modeloj de ĉiuj membroŝtatoj. Ni opinias, ke la vigligo de sociala Eŭropo tre rilatas al novigita sociala dialogo, en kiu la organizaĵoj de labordonantoj kaj sindikatoj prenas sian respondecon. Translimaj kolektivaj laborakordoj por eŭropaj transnaciaj entreprenoj estu antaŭenigataj.

## EKREGI LA FINANCAN FAKON

Kvin jarojn post la komenco de la financa krizo, nia sistemo restas superregata de bankoj, kiuj estas tro grandaj aŭ tro interligitaj por rajti bankroti, kaj sekve estas tro danĝeraj. Savaranĝoj por bankoj kostis miliardojn al la eŭropaj impostpagantoj; tio neniam plu okazu. Ni volas financon

sektoron kun racia grando, kiu estu diversa kaj elasta, kiu servu la socion kaj kiu povas zorgi por daŭrigeblaj investoj en la vera ekonomio. Ni proponas severajn regulojn por la apartigo de bankaj agadoj, per kiuj la bankaj agadoj, kiuj gravas por la publiko, estu apartigitaj de agadoj, kiuj ne estas tiaj. La Verduloj tre kontribuis por zorgi, ke la financaj produktoj kaj agadoj, kiuj ne liveras avantaĝon por la vera ekonomio, kaj kiuj eble malstabiligas la financon sistemon, povu esti malpermesataj kaj forigataj el la eŭropa merkato. La eŭropaj aŭtoritatoj devus uzi tiun eblon. Nur financaj produktoj kaj agadoj, kiuj pruvis esti avantaĝaj por la socio, estu aprobatataj. Niaj iniciatoj malpermesis spekulacion pri ŝtataj ŝuldoj; limigis bonifikojn por bankistoj; devigis bankojn konatigi agadojn en impostaj paradizoj; metis la kontrolon pri bankoj per la Eŭropa Centra Banko sub pli demokratia kontrolo. La Verduloj fieras pro siaj rezultoj en tiu kampo.

Ni nun plu konstruu sur tiu sukceso. Ni volas zorgi, ke la konsumantoj ricevu bonan, sendependan konsilon por ĉiuj financaj servoj. La leĝodonado por financaj servoj ne subtenu plian koncentradon de la merkato, kiu malavantaĝigas malgrandajn, daŭrigeblajn bankojn. Ni favoras eŭropan bankunion, en kiu forta komuna kontrolo estas kombinita kun komuna aŭtoritato, fonfaĵo por restrukturi bankrotajn bankojn kaj komunan sistemon de asekuro por deponoj ĝis 100 000 eŭroj aŭ egalvalora sumo. EU-instancoj ankaŭ kontribuu por trakti malvast-horizontecon en financaj kampoj, kiu limigas daŭrigeblajn ambiciojn ĉe strategiaj investoj.

## PUBLIKAJ FINANCOJ: JUSTAJ KAJ CELTRAFAJ IMPOSTOJ

Nun la imposta premo pezas neproporcie sur la malaltaj kaj mezaj enspezoj kaj sur malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, dum ĉiujare laŭtakse mil miljarde (= 1 biliono,  $10^{12}$ ) da Eŭroj eskapas per impost-evito kaj trompo. Nia celo estas re-igi la impostadon justaj kaj celtrafaj. Ni volas malpliigi la impostan premon sur laborado kaj juste imposti malpurigadon kaj defalaĵon. Ni faros laŭeble ĉion por instali imposton pri financaj transakcioj spite la kontraŭantan potencan premgrupan influadon. Ĉar ni volas, ke grandaj entreprenoj kaj riĉuloj kontribuu sian parton, ni favoras komunan eŭropan alprenon de impostoj por entreprenoj kaj pri riĉeco, interalie per minimumaj tarifoj. Finfine ni favoras komunan ofensivon kontraŭ impostevito, imposta trompo kaj impostoparadizo, komencante per abolo de la banksekreto. Je la elspeza flanko la Verduloj eksplicite kontraŭbatalas la malŝparajn kaj ekologie malutilajn elspezojn, kiaj subvencioj por fosiliaj brulaĵoj aŭ nukleaj programoj, kia la "Internacia Termonukleara Eksperimenta Reaktoro" (ITER)\*. La kunmastrumado de publikaj ŝuldoj per instalado de ŝuldopaga fondaĵo kaj la iom-post-ioma eldono de komunaj ŝuldinstrumentoj (Eurobonds), sub klare priskribitaj kaj realecaj reguloj por fiska disciplino, estas gravaj paŝoj por garanti la daŭron de la publikaj financoj. Por revivigi la krizan ekonomion kaj konservi la monan union ni favoras pli grandan buĝeton por EU, precipe pagota per propraj rimedoj, kaj la instaladon de financaj solidarecaj rimedoj, celante helpi pagi la ekonomian revivigon.

## RIDE: RENESANCO DE INDUSTRIO POR DAŬRIGEBLA EŬROPO

Ni volas transformi nian eŭropan ekonomion al monda ĉampiono en la kampo de efika uzo de energio kaj resursoj surbaze de malpli energikonsumaj teknikaroj kaj renovigeblaj energioj. Sed ankaŭ per la maniero, laŭ kiu ni mastrumas, uzas, reuzas, reuzebligas, anstataŭigas kaj valorigas krudmaterialojn (resursojn). Ni volas, ke efika uzo de krudmaterialoj kaj ekologia novigo subtenu la politikon kaj la investojn en ĉiuj sektoroj de la ekonomio.

Tiu verdula ofensivo kreos multajn altkvalitajn laborlokojn kaj por alte klerigitaj kaj por malalte klerigitaj laboristoj en multaj diversaj industrioj, kaj ĝi plibonigos la laborkondiĉojn kaj la sanon de laboristoj. Ĝi ankaŭ plibonigos la estontan ekonomian resistopovon (neol.: resiliencan). La industrio ne sekvu falsajn spurojn, kia borado por skista gaso, aŭ transformado de nutraĵo en brulaĵon. Anstataŭ tio ĝi iĝu grava partnero de tiu verdula transformo direktita al renovigo antaŭenigante regulojn por ekologia evoluigo, publikaj investoj, subvencioj kaj klerigado; antaŭenigo kaj entreprenemo, kaj precipe sociala entreprenemo, bonaj laborrilatoj, demokratio en la laborejo kaj la kontraŭbatalado de malsocialaj\* interesoj de entreprenoj. Ĉio ĉi apartenas al niaj streboj. Ni

volas plifortigi sindikatojn kaj la rajtojn de gelaboristoj egalrajte partopreni la decidajn procedurojn. La komerca politiko subtenu daurigeblan industriaran renesancon en Eŭropo kaj montru respekton kaj solidarecon por niaj partneroj tutmonde. Projekto, kiu en tiu kunteksto gravegas, estas la kreado de Eŭropa Komunumo por Renovigebla Energio, por kune trarompi nian sklaviĝon al fosiliaj brulaĵoj. *(tradukita de Leo)*

## **UNU PLANEDO, NIA HEJMO**

### **SERIOZE KONSIDERI LA KLIMATO-ŜANĜIĜON KAJ LA EKOLOGIAN KRIZON**

La klimat-ŝanĝiĝo kaj malpliigo de la biodiverseco minacas la sociojn tra la mondo. La ekologian krizon eklipsis la ekonomia krizo, sed la situacio fariĝas pli kaj pli akuta, kun risko de kolapso de ekosistemoj, endanĝerigante nian vivmanieron. En 2013, fine de aŭgusto, ni jam estis konsumintaj pli da resursoj ol la tero povas produkti en unu jaro.

De nun neniu dubo plu ekzistas pri la rolo de la homa aktivado kiel faktoro de la klimat-ŝanĝiĝo kaj pri la katastrofaj konsekvencoj de nia neago. La planedo proksimas la renverso-punkton de « nereveno » kaj, sen radikala ŝanĝo de nia energi-konsumo kaj niaj produkt-manieroj, la klimat-ŝanĝiĝo kaj ties damaĝaj efikoj povas fariĝi nerenverseblaj. Ekzistas tamen solvoj, kiuj povas doni konsiderindajn hommediajn, ekonomiajn, sociajn kaj prisanajn bonaĵojn.

### **EŬROPA LEĜARO PRI KLIMATO KAJ ENERGIO**

Ni volas komplete konsistan EU-leĝaron, kiu prezentas nian justan kontribuon al la tutmonde realigendaj streboj, bazita sur jure devigaj elsendo-kvantoj kaj sankcioj por certigi la atingon de la klimataj celoj. Tio kreos instigojn por orientiĝi al daŭrigebla ekonomia transiro kaj lukti kontraŭ danĝera klimat-ŝanĝiĝo. La klimata pintkunveno de la Unuiĝintaj Nacioj (UN), kiu okazos en 2015 en Parizo (COP21), devos produkti tutmondan devigan interkonsenton. Tempo pasas, kaj EU, kune kun la membroŝtatoj, devas ludi gvidan rolon en la intertraktadoj por certigi verajn sindevigojn de ĉiuj partoprenantoj. Tio ankaŭ signifas altigi la ekzistantan celon, kiu plu sufiĉas, redukti la eligojn de forcejefikaj gasoj por 2020, de 20% ĝis 30% ek de ilia 1990-jara nivelo, kaj starigi novan celon de reduktado de tiuj eligoj je minimume 55% de iliaj 1990-jaraj niveloj en 2030, cele atingi karbon-neŭtralan socion en 2050.

Jure devigaj limigoj restas la plej efikaj rimedoj por malkreskigi poluadon kaj poluajn praktikojn. La EU-Sistemo Interŝanĝi Eligojn (SIE / angle ETS) devas esti radikale reformita por fariĝi efika rimedo. Ĝis kiam tio ne estos atingita, la Verduloj subtenos naciajn minimumajn prezojn de karbono-nivelo (nivelo de CO<sub>2</sub>-eligoj). La publikaj instancoj, la entreprenoj kaj aparte la financa sektoro, devas esti instigataj malinvesti rilate aktivaĵojn (posedaĵojn) malutilajn al la klimato. Ni devas ĉesigi la publikajn subvenciojn kaj investojn pri fosiliaj brulaĵoj. Ni volas investon en eŭropaj energi-retoj, kiuj ligos la produkton de renovigeblaj energioj en diversaj lokoj de nia kontinento, kaj tiel pligrandigi la energi-sekurecon kaj malkreskigi la kostojn.

Kohera prienergia politiko, bazita sur energi-ŝparoj, energia efikeco kaj renovigeblaj energifontoj, estas la sola maniero atingi ekonomion kiu preskaŭ nur baziĝas sur renovigeblaj energioj en 2050. Tial novaj naciaj devigaj celoj pri energi-efikeco kaj renovigeblaj energioj estas esencaj. La energi-konsumo devos esti reduktata je 40% en la 15 venontaj jaroj kaj samtempe, la renovigeblaj energioj, ekskluzivante la biobrulaĵojn, devos esti forte subtenataj por atingi 45% de nia energi-konsumo en 2030. Tio estas ne nur esenca por limigi la tutmondan varmiĝon je malpli ol 2°C super la antaŭ-industriaj niveloj, sed ankaŭ havas ekonomian signifon, stimulantante ekonomian aktivadon, kreante dungadon kaj reduktante la dependon de Eŭropo je multekostaj importadoj de brulaĵoj.

Atomenergio estas multekosta kaj riska, ĝi kreskigas la danĝeron de disvastigo de atom-armiloj, kaj ne havas lokon en la eŭropa energi-fontaro.. Ni plu diros: « Atomenergio? Ne dankon! » Ni

renovigas nian engaĝiĝon por iompostioma forlaso de atomenergio en Eŭropo, certigante, ke tio ne pliiĝos la karbondioksidajn eligojn. Ni devas tuj haltigi la plej danĝerajn atom-centralojn, ĉesigi la rektajn kaj nerektajn subvenciojn, kaj postuli, ke la nunaj ekspluatantoj plene respondecu pri damaĝoj kaj konsekvencoj de atom-akcidentoj.

## DAŬRIGEBLO ESTAS LA SOLVE

Daŭrigeblo devas esti ĉe la kerno de ĉiu grava ekonomia decido. Ni volas, ke estu internacia prioritato al la protekto de la natura medio kaj biodiverseco, kaj al la daŭrigebla evoluo. Ni proponas kreadon de Monda Organizo pri Natura Medio, kiu arigu la diversajn agentejojn jam ekzistantajn en la Unuiĝintaj Nacioj, kaj plivastigu ilian rolon. Ne eblas mezuri la vivkvaliton nur per krudaj monaj indikiloj: ni bezonas novajn indikilojn por kompletigi kaj etendi la malnetan enlandan produkton (MEP) kiel indikilo de daŭrigebla prospero kaj bonstato.

La diversa natura medio en Eŭropo estas bela kaj havas valoron, kiu transpasas ĝian mon-valoron. La Verduloj scias, ke daŭrigebla evoluigo signifas saĝan mastrumon de la naturaj resursoj, tiel ke niaj infanoj, kaj la infanoj de niaj infanoj, povos daŭre havi viveblan planedon. Ni vivas trans niajn rimedojn, konsumante la naturajn resursojn je tia kvoto, je kia ili ne povas renoviĝi, kaj poluante la aeron, grundon kaj akvon per danĝeraj substancoj. Ni volas redukti nian ekologian pied-premsignon kaj nian konsumon de resursoj, kaj certigi ke iloj kaj aparatoj estas reuzeblaj, ripareblaj, kaj povas esti recikligataj, anstataŭ la aliro «destinita-por-rubujo».\* Finfine necesas socio de fermita cirkvito, kie la nedanĝeraj forĵetaĵoj de unu sektoro fariĝus la resursoj de alia sektoro.

## PRIORITATO AL VERDA TRANSPORTO

Aviado kaj aŭtotransporto estas gravaj fontoj de forcejefikaj gasoj, aer-poluado kaj bruo. La kvanto de fosiliaj brulaĵoj nun uzataj de la transport-sektoro ne nur havas tre negativan efikon al la publika sano kaj la medio, sed ĝi ankaŭ igas la EU dependa de la energi-importaĵoj kaj submetata al altiĝantaj prezoj. Ni devas turni nin al pli sekuraj kaj malpli damaĝaj por la hommedio transport-manieroj, kiaj la daŭrigeblaj akvojoj, biciklado, publikaj kolektivaj transportoj kaj relo. Necesas aparte emfazi justan konkurencon inter la diversaj transport-manieroj. Eŭropa fervoja reto devus do zorgi pri la mankantaj ligoj, por regionaj aŭ longaj distancoj, tiel ke la urboj kaj regionaj urbaj zonoj estu facile alireblaj. La translandlimaj fervojaj konektoj estu prioritataj kompare kun aviado kaj ŝoseo, speciale pri transporto de varoj. Plibonigi la energian efikecon de aŭtoj kontribuas malpezigi la brulaĵo-fakturojn de la eŭropaj civitanoj kaj altigas la kvaliton de aero. Ni volas ankaŭ stimuli la novigon, igante elektrajn biciklojn, tramojn, trajnojn kaj elektrajn aŭtojn, ĉiujn produktojn kun renovigeblaj resursoj, kiel pli allogaj alternativoj.

## PROTEKTI LA SANON KAJ SEKURECON

Kune kun la neregistaraj organizaĵoj, la Verduloj sukcese portis la temojn pri hommedio kaj publika sano en la Eŭropan Parlamenton. Ili tiel desegnis sekurec-regulojn por la kemiaj produktoj, la pesticidoj kaj biocidoj. Ni subtenas la rimedojn celantajn redukti la aerpoluon, gravan fonton de tro fruaj mortoj. Ni forte luktas por pli bona kontrolo de la elektronikaj danĝeraj ruboj, de la medikamentaj kaj pesticidaj restaĵoj elverŝitaj en niajn akvo-sistemojn, de la uzo de nanoteknologio en kosmetikoj, medikamentoj, nutraĵoj kaj biocidoj, kaj fine por malpliigo de la elmeto al la substancoj, kiuj havas negativan efikon al nia hormona sistemo.

Ni daŭrigos nian kampanjon kontraŭ la danĝera kaj malutila praktiko de ekstrakto de skistogaso kaj aliaj « nekonvenciaj » fosiliaj brulaĵoj. Venis tempo por malpermesi la skistogasojn, ni do alvokas al tuja malpermeso de la hidraŭla fendado.\* Tiu tekniko venenigas niajn akvo-fontojn kaj natur-medion per la kemiaĵoj uzataj por la fendado. La metan-likoj kaŭzataj de la ekstraktado de

skistogasoj intensigas la klimat-ŝanĝiĝon. Krome, la atendataj ekonomiaj profitoj estis tre supertaksataj, pro la rapida falo de la produktokvotoj post la unua jaro de fendado, kiuj kausas rapidan kreskon kaj falon de la lokaj ekonomioj. Ni laboros por establi zonojn sen hidraŭla fendado en Eŭropo, sekvante la sukcesan modelon de la « regionoj liberaj de Genetike Modifitaj Organismoj »

## NUTRAĴO, NE BRULAĴO

Transformi nutrajn plantojn en brulaĵojn ne estas daŭrigebla solvo al klimataj, energiaj aŭ malriĉecaj krizoj. Meti la nutraĵojn en aŭtojn, kombine kun la financa spekulado pri la bazaj nutroproduktoj, kondukas al prezaltiĝo de tiuj produktoj, akaparo de teroj, kaj minacas la nutran sekurecon de milionoj da homoj en la evoluantaj landoj, havante samtempe negativan efikon al la klimato. Interalie, la tropikaj arbaroj riĉaj je biodiverseco estas plu detruataj kaj bruligataj cele kultivi oleopalmojn, por produkti brulaĵon aŭ nutraĵo-ingrediencojn.

La EU ne devus plifortigi tiun tendencon, favorante la uzon de agrokulturaj grundoj por produkti brulaĵojn. Pli ĝenerale, ni devas forlasi la uzon de nutroplantoj por fari brulaĵojn. Inverse, ni devas koncentriĝi al pli daŭrigeblaj transport-modeloj, inkluzive la energi-efikecon de la aŭtoj kaj la recikligon de la forĵetaĵoj en brulaĵojn.

## PLI BONA NUTRAĴO, PLI BONAJ VIVOJ

Nia nutro-ĉeno misfunkcias. La industria agrokulturo, bazita sur la pesticidoj, la monokulturo (kultivo en difinita areo de unusola plantspeco) kaj trouzo de antibiotikoj, plene disvolviĝas malprofite al nia sano kaj al la medio, kaj altigis la besto-suferadon. La ripetitaj nutro-skandaloj igis la konsumantojn prave suspektemaj pri sia manĝaĵo kaj pri ĝia origino.

La Verduloj volas antaŭenpuŝi daŭrigeblan, sanigan, bongustan, diversan kaj etikan nutraĵon, anstataŭ tiun normigitan, sengustan manĝaĵon, nur destinitan ŝajni allogi sur la bretaroj de la superbazaroj. Tio implicas kuraĝigi la lokajn produkto-ĉenojn, biologian agrokulturon kaj la produktojn el la justa komerco el la evoluantaj landoj. Ni sukcesis batalon kontraŭ pluraj mallojalaj praktikoj, kaj starigis deveno-markojn kaj informadon pri la nanoteknologiaj ingrediencoj. Ni daŭre postulos klaran informadon pri la etikedado de nutroproduktoj. Ĉiujare, 90 milionoj da tunoj da nutraĵoj estas detruataj en Eŭropo: ni volas ekagadi kontraŭ tiu malŝparo. Ni lanĉis nutraĵan revolucion, kreskigis la publikan ekkonsciiĝon, la personan engaĝiĝon kaj la partoprenan demokration, por ke ĉie en Eŭropo la nutraĵ-politikoj estu redifinataj kaj plibonigataj.

## VERDIGI AGROKULTURON

De nun la Eŭropa Parlamento havas egalan respondecon en la eŭropa Komuna Agrokultura Politiko (KAP). Estas tempo por transformi nian agrokulturon al klimat-favora, daŭrigebla, justa kaj etika agado. Ni volas agrokulturajn sistemojn kapablajn adaptiĝi kaj refunkcii post perturboj, biologie diversajn, salubrajn, kiuj ne nur adaptiĝas al la klimatŝanĝiĝo, sed ankaŭ mildigas ĝin.

Ni volas pli justan sistemon de publikaj helpoj, kiu pli subtenu la etajn entreprenojn, la biologian agrokulturon, la agrokulturistojn dezirantajn reorientigi siajn produktmetodojn al tiu direkto, la lokan produktadon kaj distribuon, kiuj proksimigas agrokulturistojn kaj konsumantojn. Agrokulturistoj rajtas riĉevi decan prezon por siaj produktoj kaj la grandaj distribuaj entreprenoj ne rajtu malaltigi tiujn prezojn trans eltenebla nivelo.

Necesas kreskigi la grundo-fekundecon, ĉesigi la uzon de pesticidoj kaj kemiaj sterkoj, elimini la eksport-subsenciojn, malutilajn, kaj forlasi la intensan industrian agrokulturon. Ni daŭrigos nian kampanjon por libera kaj justa aliro al la semoj kaj selekto-materialo, kaj kontraŭ la patentado de plantoj kaj bestoj. Ni oponas la pluan privatigon de semoj kaj selekto-materialoj en la EU-regularo,



kaj ni daŭrigos lukti kontraŭ la regado de la semo-industrio fare de privataj firmaoj, regado, kiu dependigas la agrokulturistojn de semoj specife destinitaj por uzo de kemiaj sterkoj kaj pesticidoj, anstataŭ ebligi al ili konservi kaj kultivi siajn proprajn semojn kaj adapti siajn kulturojn al la diversaj lokaj kondiĉoj.

La perdo de biodiverseco kaj troa uzo de pesticidoj signifis detruon de naturaj loĝlokoj kaj kondukis al amasa malpliigo de abelnombro kaj aliaj insektoj, kio perturbas la polen-provizadon de multaj plantoj kaj kulturoj. Se ni volas sanajn fruktojn kaj legomojn, ni devas « lasi ŝancon al la abeloj ».

## NE AL GENETIKE MODIFITAJ ORGANISMOJ (GMO)

Ni ĉiam persistis en nia opono al la genetike modifitaj organismoj (GMO) en nutraĵo kaj agrokulturo, kaj en nia subteno al Eŭropo sen-GMOoj. La Verduloj daŭrigos gvidi la lukton por sanigaj nutraĵoj kaj kontraŭ kultivado de GMO sur nia teritorio, samtempe malpermesante importadon de GMO por la besto-nutrado. Ni devas postuli la rajton starigi proprajn regulojn kaj trudi devigan etikedadon por la GMO. La eŭropaj konsumantoj rajtas scii, el kio konsistas ilia nutraĵo, kaj de kie ĝi venas. La scienca esploro pri GMO devus esti limigita je la studaĵoj pri ilia efiko al la medio, inkluzive la genofluojn (gen-migradon) kaj la interkrucumitan kontaminon.

## PLI DA FIŜOJ EN LA MARO

La Verduloj ludis gvidan rolon por pli daŭrigeblaj komunaj fiŝad-politikoj. La politiko reĵeti en maron la nedeziratajn fiŝojn montriĝis granda malŝparo de nutraĵo kaj enspezoj, kaj estos de nun limigita. La fiŝstokoj estos pli bone mastrumataj kaj la kapacito de la fiŝad-ŝiparo pli bone regulata. La konsumantoj de nun povos ne nur scii de kie ilia fiŝo devenas, sed ankaŭ kiel ĝi estis kaptita. Ankoraŭ multo farendas por apliki tiujn reformojn kaj por certiĝi, ke juraj « truoj » ne estas ekspluatataj. Ni daŭre batalos por pli bone kontroli la intensan fiŝbredadon, kiu estas tre poluanta, kaj por pli juste trakti la lokan etskalan fiŝadon, interne kaj ekstere de Eŭropo.

## PROTEKTI LA BESTOJN

Ni estas konataj pro nia engaĝiĝo por la protekto de bestoj, kaj la Verduloj, ĉe la Eŭropa Parlamento, staras avangarde de ĉiuj politikaj kaj leĝaj movadoj por atingi ĉiam pli altajn normojn pri la bonstato de ĉiuj vivaj estaĵoj. Ni urĝe devas deturni nin de la industria agrokulturo, kun ĝiaj abomenaj efikoj al la besta bonstato kaj ĝia intensa uzo de antibiotikoj.

Ni luktis kontraŭ la ekscesa uzo de bestoj por testado kaj daŭrigos. Ni volas grave redukti la daŭron de besto-transportoj, kaj ĉesigi la eksportadon de vivaj bestoj. Internaci-nivele, EU devas pli energie lukti kontraŭ la kontraŭleĝa komerco de sovaĝaj bestoj, por la protekto de la maraj mamuloj, kaj defendi sian embargon pri la produktoj el fokoj. Ni subtenas la malpermeson de bredejoj por pelto-bestoj. *(tradukita de Janet Cash)*

## EŬROPO EN LA MONDO

La Eŭropa Unio ofte estis kontraŭvola ludisto en tutmonda politiko, reaganta pli ol aganta, kaj frontanta kontraŭ multaj malfacilaĵoj difinante komunajn poziciojn. Ni volas ke EU establu valoro-orientitan komunan eksterlandan politikon kaj ludu gravan internacian rolon, traktu la strukturajn kaŭzojn de malriĉeco, antaŭenigante tutmondan justecon kaj solidarecon, pacon, kaj la defendon de tutmondaj komunaj valoroj. En la hodiaŭa kunteksto de moviĝanta tutmonda potenco, kreskantaj tutmondaj malegalecoj kaj pridemandado de la universaleco de la Homaj Rajtoj, pasiveco estas ne akceptebla.

Ni volas ke EU havu komunan voĉon pri eksterlanda kaj sekureca politiko. Ni havis pozitivajn signojn ĉi-direkten pri Serbio, kaj Irano. La EU plutraktu fortajn kaj justajn partnerecojn kun landoj de la tutmonda sudo, celante reduktantajn malegalecojn ene de kaj inter socioj pere de evolua kunlaboro. La EU kaj ĝies partneroj devas kunlabori por trovi komunajn respondojn al problemoj kiel klimata ŝanĝiĝo, disvastigo de nukleaj armiloj kaj regionaj konfliktoj tutmonde, kaj ankaŭ pri la neakceptebla prirabado de naturaj resursoj en multaj landoj, precipe en la tutmonda sudo. Tia kunlaboro ne estos kredinda se ĝi ne estas demokrata, respondigebla, travidebla, kaj bazita sur universalaj principoj.

Ni volas ke EU subtenu plurlandan kolektivitan tutmondan reguligon, fortigante kaj reformante la rolon de UN, la principon de la jurŝtato, kaj la respondecon protekti. Ni konsideras la adopton de la koncepto "Respondeco Protekti" de UN kiel progreso, sed EU devas kontribui al plia detaligo kaj striktigo de la reguloj por ĝia apliko. Prioritato ĉiam estu favore al civila konflikto-administrado. Dum la lastaj jaroj energio sekureco fariĝis unu el la ĉefaj prioritatoj de la eksterlanda politiko de EU. Troa dependeco de tergaso kaj nafto igas EU koruptigebla kaj donas avantaĝon al tiaj aŭtokratoj kiuj regas la provizon de hidrokarbonoj por Eŭropo. Ni devas tranĉi ĉi tiun danĝeran kaj toksan ligan.

## HOMAJ RAJTOJ KAJ ELIMINO DE MALRIĈECO

La speciala delegito de EU por Homaj Rajtoj estis nomumita, sekvante premon flanke de Verduloj, cele al plibonigi la videblecon de la hom-rajta politiko de la Eŭropa Unio. La institucioj de EU devus baze meti la homajn rajtojn en sia ekstera politiko, inkluzivante komercon. Ni devas plenumi niajn promesojn pri la homaj rajtoj, kiam oni petas nin helpi okaze de kataklismoj. Ĉi tiu inkluzivas fortan sindevontigon al la bazaj humanitaraj principoj: homeco, senpartieco, sendependeco kaj neŭtraleco. La EU devas fariĝi pli efika, pli klare parolante por la defendo de la jurŝtata principo, libereco kaj homaj rajtoj, interalie soci-ekonomiaj kaj ekologiaj rajtoj ene de kaj ekster siaj landlimoj. Precipe, la EU estos en la avangardo starigi jure devigajn regulojn pri Kompania Socia Respondeco.

La EU kaj la membroŝtatoj devas trovi konduton rilate sian komplikecon je sekreta enkarcerigo kaj eksterjuĝejaj mortigoj, inkluzivante plenan respondigeblecon al la malobservoj de homaj rajtoj, farite por sekvi la programon de CIA. La "milito kontraŭ terorismo" devas esti finigata formale. Ĉiuj membroŝtatoj ratifu la amendojn al la statutoj de la Internacia Krime-Tribunalo, kiu permesus la juran persekuton de ŝtataj gvidantoj kiuj komencas agreso-militojn.

La EU ne sufiĉe agadis por efektiviĝi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC, angle: MDG), kiuj postulas batali kontraŭ malriĉeco, malsato, ekologia detruo kaj ekskludo de virinoj. Ni devas labori por subteni la fortajn novajn daŭripovo-celojn difinitaj de la Konferenco Rio+20, kiu kombinis la JEC-revizion kaj la proceduron de la Celoj al Daŭripova Evoluo en ununuran komunan kadron kaj donis novan aron da celoj por elimini malriĉecon kaj antaŭenigi daŭripovan evoluon post 2015. Ni alvokas la membroŝtatojn plenumi siajn sindevontigojn elspezi jare 0,7%-ojn de la Malneta Enlanda Produkto al la kunlaboro pri evoluado. Same, superrega prioritato de la EU evoluada agendo devus esti la batalo kontraŭ korupto, mon-lavado, impost-oazoj, kontraŭleĝaj fluoj de kapitalo kaj malutilaj imposto-strukturoj.

## ENLANDA SEKURECO-POLITIKO

Ekzistas la bezono plibonigi polican kaj juĝejan kunlaboron, precipe pri traktante terorismen, organizitan krimon, inkluzivante mafio-asociojn, ekologiajn kaj ekonomiajn krimojn. Sed, farante tion, la EU kaj ties membroŝtatoj ĉiukaze malhelpu stigmatizi migrintojn kaj malplimultojn. Reguloj devas esti fortigataj tiel, ke gardado de la publika ordo kaj sekretaj servoj faru nur necesan kaj proporcian agadon bezonataj por teni la Eŭropajn civitanojn sekure.

## LABORI POR LA PACO

Ĉi tiun jaron ni estas solene memorantaj la centjariĝon de la komenco de la Unua Mondmilito. La EU estis kreita certigi pacon post katastrofaj militoj, anstataŭigante alfrontiĝon per kunlaboro. Verduloj volas ke la EU aktive antaŭenigu senperforton kaj kulturon de dialogo, mediacio, repacigo kaj kunlaboro. La EU jam ludis kaj povas daŭre ludi gravan rolon pri konflikto-preventado, civila konflikto-solvado, senarmiĝo, armilo-reduktado, paco-konstruado kaj paco-savado. La EU ankaŭ plifortigu sian humanitaran rolon, ekzemple kiam temas pri la instalo de dumtempaj hospitaloj por helpi mildigi civilan suferadon en situacioj kiel civitanaj militoj. La koncepto de homa sekureco estu tre grava en la eksterlanda agado de EU. Ni ankaŭ opinias ke EU helpu al UN esti povigata kun pli efikaj rimedoj por maleskalo kaj - laŭbezone - por fortigo de paco. Nun gravas fortigi parlamentan kontrolon pri la militaj operacoj de EU, donante al la Eŭropa Parlamento decidofaran rolon. Dank' al la Verduloj, multe pli granda parto de la EU-buĝeto devos esti elspezata al konflikto-preventado per la Instrumento por Stabileco kaj Paco. Ni ankaŭ subtenis la ideon krei EU-Paco-korpuson kaj la kreo de EU-Instituto por Paco. Ni kontraŭas la financadon por militaraj esploroj el la EU-buĝeto, ekzemple por la evoluado de Eŭropaj senpilotaj aviadiloj, kaj por Eŭropo iĝante atom-milita magazeno.

Ni batalados por atoma senarmiĝo, kaj tutmonde kaj en Eŭropo, kaj por konkretaj paŝoj al mezorienta zono (Levanto) sen amaso-detruiloj. Verduloj ankaŭ volas malpermesi armilojn kiel ekzemple municioj kun malriĉigita uranio aŭ blanka fosforo. Investoj de eŭropaj bankoj, pensiaj fondusoj, asekuraj kompanioj kaj aliaj en firmaojn kiu produktas grundo-minojn kaj grapol-municiojn ankaŭ devas esti malpermesataj. Eŭropa komercado pri armiloj, inkluzivante gvatada teknologio, eksportas sensekurecon al regionoj kiel la Meza kaj Orienta Azio. Verduloj volas detranĉi ĉi tian komercon kaj malhelpi armilo-eksportojn kiuj povus esti uzataj kontraŭ libereco-movadoj kaj civilaj protestoj.

Ekstrateritoriaj celataj likvidoj ekster armita konflikto de senpilotaj aviadiloj aŭ aliaj rimedoj rompis la barojn de la establita jurŝtata principo. Ni volas vidi, ke la EU engaĝiĝas kun aliaj UN-membroj por atingi ke tiaj agoj estas tutmonde malpermesataj kiel krimoj sub la internacia leĝo pri humanitaraj kaj homaj rajtoj, kaj por haltigi la uzon de plene aŭtomatigitaj mortigaj armilekipaĵoj.

## BATALADO POR JUSTA AZILO KAJ MIGRADO POLITIKOJ

La Alta Komisiito de la Unuĝintaj Nacioj por Rifuĝintoj (UNHCR) taksas ke en 2013 estis tutmonde preskaŭ 40 000 000 delokitaj personoj, el kiuj preskaŭ duono estas rifuĝintoj ekster sia propra lando. UN indikas ke 200 000 de ĉi tiuj rifuĝintoj urĝe devas esti reloĝigataj ĉiun jaron, sed sole la duono trovas novan hejmon; pli maltrankvilige nur 4500 estas reloĝigataj en La Eŭropa Unio - kompare kun 80 000 jare en Usono.

Miloj da homoj mortas ĉe la Eŭropaj eksteraj landlimoj ĉiun jaron, pro pli kaj pli striktaj kontroloj kaj ĉar la manieroj por laŭleĝa eniro en la EU-on restas limigita. La EU havas devon certigi, ke ĉi tiuj homoj povas serĉi protekton. Ni bezonas pliajn penojn establi azilo-sistemon kiu meritas sian nomon. La Eŭropa Landlimo-Agentejo FRONTEX estas la malĝusta agento por tio, kaj membroŝtatoj malrespektas homajn rajtojn en siaj landlimaj politikoj. Ni bezonas pli grandajn penojn de la EU kaj ankaŭ de membroŝtatoj, kaj pli da kunordigo por "savado sur la maro", kaj ni bezonas laŭleĝajn kaj sekurajn manierojn por eniro, ekzemple per humanitaraj vizoj. Ni devas forigi la aktualajn regulojn (la Dublinan Reguligon) kiu devigas rifuĝintojn peti azilon nur en tiu lando kie ili unue estis enirintaj en la EU-on. Ni devus kaj en niaj fremdaj rilatoj kaj ankaŭ en niaj komercaj kaj evoluadaj politikoj, trakti la kaŭzojn kiuj devigas homojn elmigri. Verduloj sukcesis en la batalo por la kreo de EU-Komuna Re-setliga Programo kaj ankaŭ por fonduso por danĝero-kaŭzita resetligo de rifuĝintoj kiuj alfrontas humanitaran krizon. EU membroŝtatoj devas fari ĉion por plene utiligi ĉi-tiun fonduson kaj montri solidarecon, ne nur inter unu-la-alian sed ankaŭ kun ĝenataj najbaraj regionoj.

## PRENI LA GVIDON PRI KLIMATA ŜANĜIĜO

Jam de multaj jaroj la Eŭropa Unio ludis pozitivan rolon en internaciaj klimato-intertraktadoj, sed lastatempe, ĉi tiu rolo reduktiĝis. Igi Eŭropon refoje eminentan aktoron en la batalo kontraŭ klimata ŝanĝiĝo kaj degenerado de la ekologio; tio koncernas nin. Verdulojn, kiel unu el niaj ĉefaj aferoj pri eksterlanda politiko. Klimato-ŝanĝiĝo jam kaŭzas difektojn kaj suferadon tra la tuta mondo. Multaj devas forlasi sian landon kaj iĝas klimato- rifuĝintoj, pro dezertiĝo, grundo-erozio, fortega pluvo aŭ plialtiĝanta marnivelo. Ni volas vidi la koncepton de klimato-rifuĝintoj enkadrigita en la internacian juron. Sekve la EU devas ludi ĉefrolon sur klimato-migrado en internaciaj institucioj kaj ĉe si mem. Ĝi devas plibonigi sian subtenon por klimato-mildigo kaj -adapto. Klimato-financado ludas kernan rolon por evolulandoj kaj Verduloj ligos EU-on al siaj promesoj kaj respondeco. Tiel financado devas esti nova kaj suplementa al la nuna evoluhelpo. Ni ankaŭ rekomendas meti natur-medion kiel celon en evoluo-projektoj, por antaŭenigi strategion efike mildigi la klimato-ŝanĝiĝon kaj adaptiĝi al ĝi.

## PLUTRAKTANTE KOHERAN AMPLEKSIGAN KAJ NAJBARAN POLITIKON

Verduloj favoras politikon de ampleksigo de EU. Ĝi devus esti malferma al novaj membroj, kondiĉe ke ili plenumas la kriteriojn de membriĝo. Ni aprobas aliĝo-perspektivon al EU por ĉiuj landoj de la Okcidenta Balkano. Verduloj volas rapidigi justajn kaj kredindajn intertraktadojn kun Turkio. La Eŭropa Unio devas ludi vitalan rolon en sia apuda najbareco por fortigi stabilecon kaj demokration. Ni volas fortigi la Orientan Partnerecon kaj specife nian engaĝiĝon kun landoj kiel Ukrainio, Kartvelio kaj Moldavio. Ĉi tiu signifas prezentiĝi kiel principan kaj honestan partneron kun niaj najbaroj.

La EU kunlaboru kun la civila socio, asignante/donante azilon kaj subtenon al defendantoj de libereco kaj demokratio kaj asignante esploro-staĝojn al la junularo de niaj najbaraj landoj. Ni volas ke EU koncentriĝu al la transformo de la najbareco en la Mediteraneo kaj en Orienta Eŭropo kaj efike subtenu reformo-penojn en ĉi-tiuj landoj. Cetere, la EU devus plifortigi siajn partnerecojn kun aliaj ekzistantaj regionaj organizaĵoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko.

## POR JUSTA KOMERCA POLITIKO

Rilate komercon la EU estas tutmonda potenco. La Eŭropa Parlamento ludas gravan rolon en la komercaj rilatoj de Eŭropo, ĉar ĝi povas vetoi/haltigi/malpermesi komercajn interkonsentojn, kiel ĝi faris por ACTA\*. Sed ni bezonas pli bonan travideblon dum komercaj intertraktadoj kaj efikan kunlaboron inter la Eŭropa kaj la naciaj parlamentoj pri ĉi-tiuj aferoj. Verduloj favoras plurlandan komerco-ordon, sed komerco devus subteni, ne malhelpi, la evoluadon de pli malriĉaj landoj kaj la transiron al verda, sociala, justa kaj demokrata evoluo-modelo. Tio inkluzivas malfermi la merkatojn de la EU por malpli evoluitaj landoj, grandan reformon de la MOK\* por fari ĝin pli evoluo-afabla, kaj subigi komerco-regulojn sub la homajn rajtojn, socialajn kaj ekologiajn rajtojn. Komerco devas esti justa kaj ĝi ne insidu la socialan modelon de la EU.

Aktuale, multaj dupartiaj komercaj akordoj de la EU estas intertraktataj, precipe la Transatlantika Komerco- kaj Investo-Partnereco (TKIP/ TTIP\*) kun Usono. Verduloj kontestas la mankon de travideblo de ĉi-tiuj intertraktadoj, kiuj rilatas al gravaj demokrataj temoj. Verduloj ne nur defendas niajn normojn pri ekologio, sano, agrikulturo kaj nutraĵo, konsumantoj kaj laboroj, krome niajn publikajn interesojn kaj dateno-protektion, sed ankaŭ la eblecon fortigi ilin por efektivi la Verdan Novan Konsenton\*. Ni oponas ke bio-teknologiaj kaj toksaj financaj produktoj merkatumitaj en Usono estu aŭtomate aprobitaj por la EU. Ni desegnas klarajn ruĝajn liniojn kontraŭ ajna malfortigo de la leĝaro de EU. Ni rifuzas, ke oni pere de la inkluzivo de internacia disputo-instalaĵo inter investanto kaj ŝtato permesas al konzernoj iniciati proceson kontraŭ demokratie elektitaj registaroj por protekti kompaniajn interesojn kontraŭ socialaj aŭ ekologiaj reformoj. Ni mobilizas kontraŭ iu komerca interkonsento kiu ne respektas ĉi-tiujn principojn; kaj tial ni kontraŭas la TKIP (en: TTIP) en ĝia aktuala formo. (*tradukita de Manfred*)

## POR PLI VIGLA DEMOKRATIO

Pli da demokratio, ne malpli, estas la respondo al la krizo. Strukturoj kiaj la Trojko estas fundamente nedemokratiaj. Laŭ ni gravegas moviĝo direkte al pli da partoprenigo de la civitano, respondecas kaj travidebleco por akiri legitimecon por futura Eŭropa kunagado. Tio signifas, ke ni Verduloj laboras cele de altigita travidebleco en la tuta proceduro de leĝofarado, ek de la Komisiono tra aliaj EU-institucioj ĝis la membroŝtataj registaroj. Eĉ pli grave, ni laboradas por la rajto de la civitanoj determini la futuron de la Unio per multigo de iliaj elektebloj en la tuta leĝdona proceduro.

## SEN GENRA EGALCO NENIU DEMOKRATIO

Genra demokratio signifas, ke virinoj estas parto de la publika vivo de la socioj kaj egalrajtigitaj kiel la viroj faras decidojn en institucioj kaj kompanioj. Laŭ la Verduloj la reago de la EU devas baze meti genrajn temojn je ĉiuj politikaj niveloj. Ni subtenas la Komisionon en ĝia laboro pri jure devigaj kvotoj por virinoj en korporaciaj estraroj. Tamen, rigarde la aktualan rapidon bezonatus pli ol 50 jaroj ĝis kiam 40% de ĉiuj estraraj membroj de Eŭropaj kompanioj estas virinoj. Pro tio ni postulas la kvoton por atingi ĉi-tiun celon antaŭ la jaro 2020.

Por gajni egalecon la EU laŭ ni adoptu pli inkluzivan politikan alpaŝon kontraŭ genrokoncerna perforto, inklude de la EU-leĝofarado forme de direktivo, proponanta rimedojn por trakti perforton kontraŭ virinoj, kiuj baziĝas sur politiko, prevento, protekto, persekuto, provizo kaj partnereco. La Konvencio pri Homaj Rajtoj de la EU postulas de ĉiuj membroŝtatoj difini kiel krimoj seksperforton kaj seksatencojn kontraŭ virinoj ene de geedzeco kaj en neformale intimaj rilatoj.

## CIVITANOJ KIEL EŬROPAJ DECIDOFARANTOJ

Ni volas fortigi la eblecojn de Eŭropaj civitanoj influi decidojn. Ni volas labori por pli da partopreniga demokratio. Verduloj helpis enkonduki la Inicativon de Eŭropaj Civitanoj (IEC), kiu permesas al la civitanoj de la EU turni sin al la Eŭropa Komisiono fari proponojn koncerne leĝodonadon. Nun estas tempo fari pluan paŝon. Ni volas ampleksigi la kampon de la IEC kaj igi ĝin pli efika kaj pli taŭga por la civitanoj. Ni volas ankaŭ krei juran fundamenton por EU-vasta referendumoj.

Kie en iu EU-membroŝtato civitanoj estas senigataj de siaj rajtoj sen rimedo de la nacia jurisdikcio ili havu la eblecon de kolektiva jura agado en la Eŭropa Kortumo de Justeco. Ni daŭrigos severe batali kontraŭ la bone establita kaj bone provizita lobiado kiel la agro-kemia industrio aŭ gigantaj semokompanioj. Ni postulas pri-nutraĵan demokration, kie la civitanoj regajnas kontrolon pri kio ili manĝas kaj povas krei honestajn kaj daŭripovajn nutraĵ-produktajn kaj – provizajn sistemojn.

## FORTIGI LA ROLON DE LA PARLAMENTO

Pere la elekto de la parlamentanoj, la civitanoj havas voĉon kiel trakti gravegajn demandojn de nia tempo, de klimatoŝanĝiĝo ĝis reguligo de bankoj, de politiko pri rifuĝintoj ĝis junulara senlaboreco. Ni volas plifortigi la rolon de la Eŭropa Parlamento, aparte koncerne la mastradon de la EU-krizo kaj la kreadon de ekonomia politiko. Ĝi havu la rajton kundecidi pri la prioritatoj de la kunordigo de ekonomia politiko. Ni volas malaltigi la balotpovan aĝon por la elektoj al la Eŭropa Parlamento al 16 kaj aldone enkonduki tuteŭropajn listojn kun transnaciaj kandidatoj.

La kreskanta influo, donita al la Eŭropa Parlamento de la Traktato de Lisbono devas esti uzata responde kaj ne subfosata de lobiaj interesoj. Pli da travidebleco kaj respondeco estas bezonata en la Konsilantaro de la Ministroj de la Eŭropa Unio, ekzemple per publikigo de ĉiuj balotaj rezultoj.

Cele pli vastan kaj pli malferman debaton necesas, ke la naciaj parlamentoj transprenas pli da respondeco per altrudo de pli bona kontrolo pri la agado de siaj registaroj koncerne Eŭropajn aferojn. Ni volas plifortigi ankaŭ la eblojn de la naciaj parlamentoj reagi kiam la EU troigas sian aŭtoritaton pere de neobeado al la reguloj pri subsidiareco. Naciaj parlamentoj havu ankaŭ pli da vojoj de kunlaborado kun la Eŭropa Parlamento. Sur ĉiuj niveloj de regado, de la loka ĝis la regiona, de la nacia ĝis la Eŭropa, ni postulas plifortigitajn interagojn kaj sinergiojn cele pli bonan artikuladon de Eŭropaj politikoj kaj ties efektiveco ene de regionaj kaj teritoriaj organizaĵoj.

## BATALI KORUPTON KAJ FRAŬDON

La EU bezonas pli fortan kontraŭkoruptan politikon kaj pli efektivajn instrumentojn kontraŭ organizita krimo por plifortigi demokration kaj la jurŝtatecon, kaj ankaŭ por plifortigi la Eŭropan ekonomion. Korupta konduto de EU-funkciuloj aŭ parlamentanoj en ties rilatoj kun lobiistoj devas esti sankciata per severaj reagoj. La grandaj konzernoj ankoraŭ tro forte influas al la Komisiono. Preskaŭ 80% de ĉiuj aguloj, asignitaj de la Komisiono, reprezentas interesojn de korporacioj, malgraŭ devontigo al ŝanĝiĝo. Verduloj ankaŭ batalas por superi la problemon de "rotaciaj pordoj", kie ĉefburokratoj kaj politikistoj de Eŭropaj institucioj kunvenas kun privataj organizaĵoj, kiujn ili antaŭe reponsece reguladis. Ni volas protekti la demokration kontraŭ korupton pere de enkonduko de firma regulado kaj travidebleco koncerne financado por politikaj partioj, kandidatoj kaj balotkampanjoj. Ni volas provizi la Justico-Kortumon de la EU kaj la Eŭropan Kortumon de Revizoroj per pli fortaj iloj por kontroli la manieron, laŭ kiuj la resursoj de la EU estas elspezataj, kaj por agi kontraŭ korupton en ambaŭ, kaj en la EU-institucioj kaj kaze de seriozaj problemoj ene de la membroŝtatoj.

## PLI DA RESURSOJ POR LA EU-BUĜETO

La EU-buĝeto devas esti altigata kaj devas esti principe bazita sur sistemo de propraj resursoj, ekzemple ia karbono- kaj/aŭ energio-imposto, por redukti la dependecon je naciaj kontribuoj. Interregistaraj intertraktoj tro ofte preteratentas la komunan intereson, kiel kaze de la buĝetaj intertraktoj en la jaro 2013, kiuj fiaskis liveri efektivajn politikajn rimedojn por solvi la krizon. Verduloj forte batalis por pli granda respondeco kaj travidebleco rilate la buĝetofaradon. Ankaŭ ĉi tie ni proponas pli da partoprenado: civitanoj povus ricevi la rajton registriĝi por pilotprojektaj iniciativoj, aprobendaj de la buĝeta komitato de la Eŭropa Parlamento.

## CIFERECA LEĜARO

La Verduloj en la Eŭropa Parlamento estas ĉe la fronto de la batalo por ciferecaj (diĝitaj) rajtoj. Ni helpis haltigi la Komerca Konvencio Kontraŭ Falsigado (KKKF) kaj batalas por forta protekto de personaj datenoj, por rajtoj pri privateco kaj por strikta reto-neŭtraleco. Nun estas la tempo por defendi kaj protekti ambaŭ, la civitanojn de Eŭropo kaj la interreton kontraŭ trapenetrema korporacia kaj registara observado kaj por sekurigi la fundamentajn rajtojn en la cifereca (diĝita) epoko. Personrilataj datenoj apartenas al individuaj civitanoj, sed ne al kompanioj aŭ registaroj. Privateco devas esti respektata. La leĝo pri daten-retenado, kiu devigas itelekomunikado-provizaj firmaoj stoki datenojn pri komunikadpartneroj de civitanoj, estas serioza eraro kaj devas esti aboliciata. Registaroj devas sekvi siajn proprajn leĝojn. Dum nacia sekureco estas grava, personaj liberecoj ne estu lezataj. Registaroj devas certigi, ke nacia sekurec-agentoj laboras por ĉiuj civitanoj por sekurigi liberecon por ĉiu. (*tradukita de Wolfgang Günther*)

## KONSERVI LA JURŜTATON

Eŭropa Unio baziĝas sur la valoroj de respekto por homa digno, libereco, demokratio, egaleco, jurŝtato kaj respekto por homaj rajtoj. La Verduloj faras neniun kompromison pri homaj rajtoj. Plurismo, ne-diskriminacio, toleremo, justeco, solidareco kaj egaleco inter virinoj / viroj devas domini. Ege mankas virinoj en la EU-institucioj, kaj en multaj membroŝtatoj tro multaj homoj suferas pri diskriminacio sub diversaj pretekstoj. Verduloj insistos por ke efikaj anti-diskriminaciaj politikoj baraktas kontraŭ tiuj maljustecoj. Ili jam delonge estas favoraj al la evoluo de anti-diskriminaciaj direktivoj al direktivo je plena egaleco.

Por ke niaj demokratiaj rajtoj estas respektataj kaj agnoskataj, ni devas defendi la jurŝtaton EU-nivele kaj naci-nivele. Al EU mankas rimedoj por efika kontrolo kaj sankcio kiam estas rompoj de niaj valoroj en la membroŝtatoj. Tio estas kial la Verduloj estas la unuaj por peti la kreadon de "Kopenhaga Komisiono" konforme kun la EU traktatoj kaj la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj, por certigi ke la demokratiaj postuloj, plenumendaj flanke de la kandidataj landoj por aliĝo al EU, ne estas forgesataj kaj sekvataj de reveno al aŭtoritatismo kaj "aranĝo inter amikoj" post la aliĝo al la EU.

La impona listo de garantioj kaj protektoj de la ĉarto de la fundamentaj rajtoj devus esti pli bone meti en praktikon ĉiutage. Seksaj kaj reproduktaj rajtoj estas esencaj elementoj por la homa digno. Ni, Verduloj, defendas la rajton je memdeterminado por niaj propraj korpoj.

## VERDA DEMOKRATIA REFORMO DE EU

Demokratio neniam estos finfine atingata aŭ kompleta. Klimatŝanĝiĝo kaj tutmondiĝo estas du defioj pri kiuj bezonatas procezo de plibonigita komuna decido. La Eŭropaj Verduloj estas konvinkitaj, ke la nuna institucia kunteksto de la EU ne kunvenas la alfrontantajn problemojn. La disvolviĝo de la eŭro-zono kaj banka unio signifas ke ni bezonas taŭgajn demokratiajn reformojn kiuj plifortigas la legitimecon, la travideblecon kaj la efikecon de la decidofara proceso ankaŭ en tiuj fakoj. La Verduloj venigu reformon de kapabloj en diversaj niveloj de EU-regado. Tio signifas

ekzemple, ke La EU devus havi kelkajn kompetentojn pri fiska kaj sociala politiko, kie la Eŭropa Parlamento devus esti kuna leĝodonanto.

Niaj postuloj por pli da demokratio, pli da travidebleco kaj politika respondeco postulus klarajn ŝanĝojn en la funkciado de EU. La Eŭropa Parlamento devus havi la rajton iniciati novajn leĝojn. Eŭropo ne povas simple atendi ke la ŝtatestroj kaj ĉefministroj faras limigitajn iniciativojn kiuj nur kondukas al pli teknokratia kontrolo. Tre simpla ekzemplo: La Eŭropa Parlamento volas decidi pri sia sidejo kaj haltigi la tien-reen-cirkon inter Strasburgo kaj Bruselo. La Verduloj subtenas tiun postulon, same kiel la plej multaj eŭropaj civitanoj. La Eŭropa Parlamento bezonas pli grandajn potencojn je leĝdona kundecido, dum la naciaj veto-raĵtoj estu reduktitaj. Tamen, kelkaj temoj devus esti decidataj pli proksime je la civitanoj.

La mandato kaj respondecoj de la eŭropaj institucioj kiuj reprezentas la regionajn kaj lokajn aŭtoritatojn, social-ekonomiajn aktorojn kaj civilan socion devus esti fortigataj. Tial ni volas novan demokratian konvencion, kun forta partopreno de parlamento kaj civila socio pere de plene travideblaj proceduroj, aŭ Konstitucio-Asembleon por determini la estontecon de la eŭropa integriĝo. Eŭropaj civitanoj devus ja esti kapablaj decidi la estontecon de Eŭropo - kaj havu finan decidon en EU-vasta referendumo. *(tradukita de Marc Anselmi)*

## LA EŬROPA VERDA PARTIO

La Eŭropa Verda Partio (EVP) reprezentis la unuan politikan familion, kiu evoluis en la jaro 2004 de federacio al politika partio je eŭropa nivelo. Nia membroj estas 45 naciaj Verdaj partioj el tuta Eŭropo, ene de la EU kaj ekstere, apogante sin reciproke kun la celo fortigi la Verdajn politikojn en Eŭropo. En la retejo de EVP vi trovos la liston de la plenrajtaj membro-partioj, membroj asociitaj kaj kandidataj membroj) ene de la Eŭropo - vi povas elekti lau listo au lau la mapo:  
<http://europeangreens.eu/map>

### Glosaro kaj terminologiaj komentoj:

ACTA = Anti-Counterfeiting Trade Agreement - Komerca Konvencio Kontraŭ Falsigado  
cifereca = diĝita

genra = ankaŭ se temas pri sekso en la socia sfero, ekz-e pri laborlokoj, kaj salajroj

ITER = eksperimentoj por fuzia nuklea reaktoro

LGBT+ = lesboj, gejoj, biseksemuloj, transvestuloj k.t.p.

malsocialaj interesoj de entreprenoj = (orig: corporate vested interests)

MOK = Monda Organizaĵo pri Komerco = WTO, World Trade Organization

obsolesko (neol.) = destinita-por-rubujo (angle: designed-for-the-dump), «programita eksmodiĝo »

TTIP = Transatlantic Trade and Investment Partnership / Transatlantika Komerco- kaj Investo-Partnereco (TKIP)

Verda, verdula = se temas pri membro de Verda Partio ni uzas anstataŭ Verda la pli klaran „verdula“ minuskle.

Verda Nova (Inter-)Konsento = “Green New Deal”

### anglaj neologismoj kaj grandaj nombroj tutmonde diverse ol laŭ la usona sistemo !

to mainstream = baze meti

fracking = hidraŭla fendado

global governance = kolektiva reguligo

miljardo =  $10^9$ , biliono =  $10^{12}$ , biljardo =  $10^{15}$

-----

*Tradukita el la angla originalo fare de AVE-anoj (Asocio de Verduloj Esperantistaj):*

*Janet Cash, Leo de Coolman, Manfred Westermayer, Marc Anselmi, Wolfgang Günther.*

*[www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)*